

Kulturaj Kajeroj

E.MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1977 6

KULTURAJ KAJEROJ

1977 NOVEMBRO-DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Literaturo de la unuaj Islandanoj

Nutrado en la antikva Egiptujo

Kiel Pantagruelo venis al Grezijono por peti helpon

Sur la honorkampo

Totala grefto

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

La Esperantista Kulturdomo deziras al la legantoj de Kulturaj Kajeroj ĝojon kaj sanon por 1978

El Grésillon

Dank'al favora vetero ankoraŭ meze de novembro la aspekto de Gresillon ne multe sanĝiĝis pro la multaj floroj gajigantaj la parkon. Nur la flaviĝantaj folioj montras, ke alproksimiĝas la vintra dormo.

La vekiĝo okazos la 8-an de aprilo 1978 decidis la konsilio. Tiam kunvenos infanoj diversnaciaj por kune labori, ludi, ekskursi. Kompreneble ankaŭ plenkreskuloj estas invititaj partopreni ĉar la infanoj bezonos ilian helpon aŭ nuran ĉeeston. La personoj interesitaj de kursgvidado povos ĉeesti la kursojn, diskuti pri instrumetodoj kaj teknikoj, eventuale profundigi siajn konojn. Se kandidatoj prezentiĝos okazos sesio de la Atesto pri Pedagogio.

La tri someraj periodoj disvolviĝos laŭ la kutima programmo : kursoj kaj prelegoj de la 3-a ĝis la 23-a de julio ; kursoj de la 24-a de julio ĝis la 13-a de aŭgusto kaj de la 14-a de aŭgusto ĝis la 3-a de septembro. Ankaŭ ekskursoj okazos, parte kiel kompletigoj de prelegoj. Ni jam devis respondi informpetojn kaj registri aliĝojn. Rapide petu la programon kaj aliĝilon. Vi povos konstati novajn sanĝojn ĉar la konsilio decidis aranĝi du kurso-ĉambrojn.

La konsilio konstatis, ke ne estas facile organizi la diversajn periodojn kaj ankaŭ, ke jam de pluraj jaroj la programo ne sanĝiĝis. Ŝajnas, ke tia programo eĉ iom rutina, plaĉas al la esperantistoj ĉar ili venas multnombraj. Sed ni dezirus tamen iom renovigi niajn aktivaĵojn. Pro tio ni esperas, ke okaze de la venonta balotado almenaŭ kelkaj gutoj de juna sango eniros la administran korpon. Ni ankaŭ esperas, ke esperanto-asocioj francaj kaj ne-francaj iam proponos organizi en la kastelo siajn proprajn aranĝojn malfermitajn al ĉiuj eĉ ekster la organizanta asocio. Kompreneble, dum la printempaj monatoj, ĉiam eblas disponigi la kastelon kaj ties strukturaĵon al anaroj eĉ por mallonga tempo.

La kulturdomo estas nur 25-jara. Sed organizoj pli rapide maljuniĝas ol virinoj. Jam Gresillon devus iom junigi sian vizaĝon.

Esperanto tra la Mondo

Por la universala kongreso en Varna.

— La alta protektanto de la kongreso estos S-ro P. Tančev, unua vicprezidanto de la ŝtata konsilantaro de Bulgario, kaj la rektoro de la sesio de Internacia Somera Universitato, Prof. Vasil Peevski, prezidanto de la bulgaraj geodezistoj.

— Okaze de la kongreso, Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) kaj « Monda Turismo » preparas vojaĝon-ralion por la individuaj aŭtomobiloj. Por ricevi la planon kai detalajn informojn, skribi al : IEKA, J. Guillaume, 66 village de Grasse, 78810 Feucherolles (Francio), kaj « Monda Turismo », Stiegerg, 6/22, A-1150 Vieno (Aŭstrio). Sekretario por Beneluksio : S-ino Th. M. Henquinez, Lipsestraat 166, B-2991 Tildonk (Belgio).

Ankaŭ en 1978

— La Internacia Junulara Kongreso okazos en Velika Tarnovo (Bulgario) 22 — 29a de Julio, do la semajnon antaŭ la universala kongreso.

— Kongreso de la esperantistaj fervojistoj : en Romo (13-20a de Majo).

En la kongreso de la mondcivitanoj

Dank'al la klopodoj de S-ino Volpelière, respondeculino de « Internacia Esperanto - Centro de la Mondcivitanoj » (8, rue Rouget-de-Lisle, F - 30000 Nîmes, Francio), favora rezolucio estis akceptita dum la kongreso de la mondcivitanoj, en Parizo, dum Julio.

Estus absolute necese ke multe pli da esperantistoj iĝu mondcivitanoj kaj rilatu kun S-ino Volpelière (kiu eldonas bultenon en Esperanto) por ke Esperanto disvastiĝu en tiu favora medio. Cetere, la celoj de la du movadoj bone kompletiĝas.

Nova Esperanto-centro en Tokio

Japana Esperanto-Instituto decidis konstrui novan esperanto-centron en Tokio (la nuna, ligna konstruaĵo, kadukiĝas). La nova domo estos espereble inaŭgurita en Junio. Ĝi estos kvaretaĝa, kun biblioteko, kunvenejo, kurs-ĉambro, vendejo, oficejo, deponejo, presejeto, loĝejoj. Por finkonstrui la domon, J.E.I. eldonas « bonvolajn brikojn ». Informas : Komisiono de Esperanto-domo, J.E.I., Hongo 2-2-4, Bunkyo-ku, Tokio 113.

Universitata simpozio

La universitatoj de Venecio (Italio), kaj « E. Lorand » de Budapeŝto organizos en 1978 simpozion pri interlingvistiko, kun aparta konsidero al Esperanto. Rajtos partopreni nur la italaj kaj hungaraj specialistoj.

Fako en biblioteko

Kiel oficiala fako de la urba publika biblioteko en la belga urbo Kortrijk, la esperanto-fondaĵo C. Vanbiervliet, disponas ĝis nun pli ol 5500 erojn (libroj, jarkolektoj de revuoj).

En aziaj universitatoj

— Fondiĝis du novaj studentaj esperanto-kluboj, post kursoj, en la universitatoj de Gugge kaj Mjonggi (Suda Koreujo).

— 120 gelernantoj en Esperanto-kurso, en Fu-jen universitato (Taivan).

Interesa agado en Britio

En Britio, kie jam ekzistas parlamenta grupo de amikoj de Esperanto, kaj la « Grupo Kvin » (Esperanto en la radio kaj televido), fondiĝis TUCEG (sindikata kaj kooperа esperanto-grupo). Inter la apogantoj estas gravaj sindikataj funkciuloj, kaj la grupo disdonis inter la sindikatanoj 100 000 ekzemplerojn de informilo pri Esperanto.

Por la blindaj esperantistoj

La Pola Asocio de nevidantoj registris « La Faraono » de Boleslaw Prus, sur 38 unuhoraj kasetoj, kaj baldaŭ registros « Quo Vadis » de Sienkiewicz. Por akiro aŭ interŝanĝo, rilati kun P.Z.N., Biblioteka Niewidomych, ul. Konwiktorska 9, 00-216 Warszawa (Pollando).

Medicinista konferenco

Pola studenta rondo en Krakovo kaj Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) aranĝis konferencon kiu kunigis en Krakovo, dum Julio, 58 personojn el 7 landoj. Dum la 5 tagoj okazis fakaj prelegoj. La sekvonta konferenco okazos en 1979, en sudhungara urbo Hodmezovasarhely. Sekretario de UMEA por Eŭropo : D-ro Imre Ferenczy, H-9002 Gyor 2, poŝtfako 143 (Hungario).

Impona katolika esperanto-kongreso

Ĝi okazis dum aŭgusto en Ĉenstoĥava (Pollando) sub alta protektado de Kardinalo Vojtyla, el Krakovo. 707 kongresanoj el 22 landoj ĉeestis la inaŭguran meson kuncelebritan de 7 episkopoj kaj 50 diverslandaj pastroj.

La 10a Pupteatra Internacia Festivalo

Tiu nun tradicia renkonto de pupteatroj, kiuj uzas Esperanton kiel scenlingvon, okazis en Zagreb dum oktobro. Okazis 14 prezentoj plenumitaj de pupensembloj el Jugoslavio, Rumanio, Pollando, Bulgario, Alĝerio.

Ĉeestis delegitaro de la norvega urbo Tromsoe, ĝemelurbo de Zagreb. La urbestro de Tromsoe invitis la festivalon en Norvegujo en Junio 1978.

Universitataj lekcioj

Ekde Septembro 1977, D-ro D. Blanke, konata esperantista universitatano, estas instrukomisiito ĉe Humboldt - Universitato en Berlino (Germana Demokrata Respubliko) por 15 prelegoj pri la temo : « Planlingvoj en teorio kaj praktiko ». En tiu por ili deviga studo, partoprenas 60 studentoj (inter ili estas 20 eksterlandanoj).

Konkurso de kanzonoj en Esperanto

Okaze de la franca nacia kongreso de Esperanto 1978, okazos konkurso pri kanzonoj en Esperanto.

La konkurso okazos la 13an de Majo kaj oni antaŭvidas valorajn monpremiojn. Peti detalojn ĉe : S-ro J.-P. Boulet, 7, ave. du Forez, F - 63800 Cournon-d'Auvergne (Francio).

Ekspozicio pri literaturo en Belgujo

Ĉeno de ekspozicioj pri la esperanto-literaturo komenciĝis dum Oktobro en Bruselo. La ekspozicio devas migri al kulturdomoj, junularcentroj, universitato de la ĉefurbo.

Ĝi entenas pli ol 300 elektitaj librotitoloj.

2a Internacia Renkontiĝo de Freinet Edukistoj

Ĝi okazos en Arjang (Svedio) de la 23a de Julio ĝis la 5a de Aŭgusto. Informojn : Jean Marin, 9, rue Adrien-Lejeune, 93170 Bagnolet (Francio). Skribu tuj se vi deziras partopreni, ĉar kelkfoje, ekkomence de januaro, ne plu estas liberaj lokoj !

Literaturo de la unuaj Islandanoj

POEMOJ SKALDAJ, EDDAJ - SAGAOJ

La unuaj Islandanoj parolis dialekton parencan al tiuj de Skandinavio, Skotlando, Irlando kaj Nord-Anglujo. Tiuj skandinaviaj dialektoj iom post iom modifiiĝis aŭ malaperis. Tamen, en Islando, la lingvo postvivis kaj konservis sian arkaismon ; tial la hodiaŭaj Islandanoj povas legi la antikvajn tekstojn de la Sagaoj kaj de la Poemoj Skaldaj kaj Eddaj.

La unuaj Islandanoj ne havis librojn kaj ne konis Skribon ; ĝis fine de la 11-a jarcento ekzistis nur Parola Literaturo, proza aŭ versa ; kaj parkere recitita kaj fidele transdonita de generacio al generacio.

La Aĝo de la Tradicio

Estas unue la rakontoj pri la vivo de la klanoj ; la kvereloj, la aliancoj, la ĉiutagaj okazaĵoj : la roko, kiu kaŝis la murdinton ; la ĉasisto, kiu mortigis du cignojn per unu nura sago ; la rivereto apud kiu renkontiĝis la junulino kaj ŝia galantulo ; la fjordo, kiun postkurita juna virino naĝe transiris kun siaj infanoj sur sia dorso ; la kaverno en kiu la proskribito vivis dum 11 jaroj.

Ankaŭ oni elvokas, en poemoj, la eventojn de la koloniado, tiujn pri Eŭropo, kiun oni forlasis ; ankaŭ la rilatojn de la homoj kun la dioj.

La Eddaj Poemoj (Eddo signifas pra-avino, do : el tradicio) entenas la heroajn poemojn kaj la poemojn mitologiajn aŭ didaktikajn.

La heroaj poemoj enscenigas la historiajn heroojn, kiuj vivis en la tiutempa Eŭropo. La popola imagpovo igis ilin personoj pli malpli fabelaj, superhomoj (kiel tiuj de Homero) eltiritaj el la tradicioj Burgundaj, Ostrogotikaj kaj Frankaj : estas Sigurd (la Sigfried de Wagner), Sigebert murdita de Fredegonda, Brunehaut ; la legendo de la Niflungar elvokas Atilon kaj la lukton de la Hunoj kontraŭ la Burgundoj.

La poezio mitologia kaj didaktika estas tute ligita al paganaj kredoj. Post la lasta glacia epoko, la vivo estis denove ŝprucinta ; tiu fenomeno nutris la legendon pri la Kreado de la Mondo, en la poemo la Völuspa = la Profetaĵo de la Vidantino :

El la Granda Abismo, el la Malvarmo, el la Tenebroj ŝprucis la Fajro kaj la Glacio, kiuj naskis la precipajn Gigantojn kaj la Diojn. Ilia lukto kondukis al Diluvo, el kiu elsaviĝis nur unu paro da Gigantoj. Siavice ili naskis aliajn gigantojn, bonajn aŭ malbonajn laŭ la Naturaj Fenomenoj, kiujn ili reprezentas, kaj kiuj estas favoraj aŭ malfavoraj al la homoj. Naskiĝis ankaŭ la Nanoj, forĝistoj, oraĵistoj, trezor-gardistoj, kiuj loĝas en la profundaĵoj de la Tero. Naskiĝis ankaŭ la Homoj kaj la diigitaj Herooj : Thor, dio de la fulmo, kies nomon oni trovas en multaj propraj nomoj. Odin, dio de la milito, de la poetoj kaj malamiko de la Gigantoj kaj Demonoj ; li vizitas la Inferojn. Balder, la luma dio de la Saĝeco kaj de la ĝojo. Frigg edzino de Odin kaj patrino de la dioj. Loki, la perfidulo. La korvo akompanas Odin. La ĉevalo-de-la-Tago (la Suno-ĉevalo) estis buĉoferita al la dioj ; ankaŭ la apro kaj la porko. En kavernoj kaŝiĝas la bestoj-demonoj ; la lupo Fenrir okazigas katastrofojn.

La Serpento de la Mondo ĉirkaŭas la Teron kaj mordas al si la voston. La Homaro vivas en Meza Loĝejo inter flamoj kaj glacioj. Supere troviĝas Asgard, la loĝejo de la dioj kaj la Valhalo, kie vivas la mortintaj herooj kun la Valkirioj.

En la Islanda vivo, la Sorĉistinoj-Profetinoj ĝuis eksterordinaran prestiĝon. Ili translokiĝis de unu farmo al la alia kun granda eskorto de 30 lakeoj kaj 15 junulinoj. Jen Thörbjôrg : vitraj perloj kaj juvelŝtonoj ornamas ŝian manbastonon kaj ŝiajn vestojn subŝtofitajn je peltoj ; ŝiaj magiaj objektoj estas en leda sako. Pli malpli afable ŝi akceptas la bonvenajn parolojn, ĉu la akceptantoj plaĉas aŭ ne al ŝi (El la Sago de Erik la Ruĝulo).

La Skalda Poezio

La Skaldoj estas konataj poetoj. La Islandaj riĉ-familiaj filoj reiris Norvegujon. Ili partoprenis militajn ekspediciojn ; ili iĝis komercistoj. Ili multe vojaĝis ; ili restadis en Britujo, Danlando, en Konstantinopolo, en Hôlmgard (Novgorod). Ili vivis ĉe la Kortego de la Princoj ; iliajn grandfarojn ili celebris en poemoj, kies stilo estis esotera, kompleksa kaj riĉa je metaforoj. La skaldoj ĉie ricevis honorojn, oron, konfidajn postenojn. Se prefere ili improvizis strofojn pri bataloj, ili ankaŭ prikantis la belecon de la junulinoj kaj la tristecon de la malfeliĉa amo.

La unua granda Islanda Skaldo estis Egill Skallagrimsson (910-980), vikingo fama pro siaj militaj heroaĵoj. Li verkis malgrandajn versaĵojn, inter kiuj troviĝas la emocia Sonatorrek, kie li ploras la morton de sia filo.

Pli poste multaj islandaj studentoj frekventis la Universitatojn de Germanujo kaj Francujo. Saemund Sigfusson revenis el Parizo kun reputacio de scienculo pri ĉiuj sciencoj, eĉ la okulta.

Manuskriptoj

Dum la 12-a jarcento, la diskonigo de Kristanismo alportis Skribon. De tiam la parolaj tekstoj estis transskribitaj en manuskriptojn. Kvankam la latina alfabeto anstataŭis la malfacilajn runajn signojn, la tekstoj restis en islanda lingvo (dume, en Eŭropo, ĉie oni uzis la latinan lingvon).

Ĝis fino de la 13-a jarcento, la Islandanoj uzis la bovidan ledon por fari la pergamenojn kaj la vegetalajn inkojn por skribi kaj dekoracii la tekstojn. La 700 pergamenoj hodiaŭ restantaj estas nur la dekono de la tiamaj manuskriptoj. La Flateyjarbôk, la libro de Flatey, estis ellaborita en 1380-1390 ; ĝiaj 400 paĝoj (21 × 23) bezonis 100 bovidajn haŭtojn. Kontraŭe aliaj manuskriptoj ne estis pli grandaj ol alumet-skatoloj. En la farmoj, kiel en la monakejoj, la kopisto uzis la feblan lumeton de seba kandelo aŭ tiun de fiŝ-olea lampo.

La senĉesaj kvereloj inter la klanoj okazigis la eksterminadon de la familioj kaj la ekfiniĝon de la Islanda sendependeco. Ĉar la ligno mankis por ripari aŭ konstrui ŝipojn, la norvegaj ŝipoj plenumis la var-transportojn. En 1264 la Norveguja reĝo Haakon la Maljunulo kaptas Islandon. En 1380, Norvegujo kaj Islando pasas sub la Danan Regadon.

La rigora klimato, la senĉesaj glacirompiĝoj, la glacimontoj, la nesufiĉeco de la komercado iom post iom ruinigas la biendomojn ; mizeraj kabanoj ilin anstataŭas. La 17-a jarcento alportas vulkanajn erupciojn, pesto-epidemion, malsategon. La mizero estas tiel granda, ke la manuskriptoj servas por plidikigi la tegmentojn kaj ŝtopi la truojn de la ŝuoj. Tamen la Islanda scienculo Arni Magnusson (1605-1675) retrovas grandan kvanton de tiuj manuskriptoj kaj ilin transportas al Kopenhago.

Aĝo de la Erudicio

La unuaj libroj aperis en la 12-a jarcento. Ili estis unue Utilaj Tekstoj. En 1117 estis la Islanda Legô, de tiam skribita kaj legita en Althing. En 1123 estis la Eklezia Kodo. Poste aperas la Unua Gramatika Traktaĵo, de nekonata aŭtoro, kiu fiksis la alfabeton kaj la uzadon de la lingvo.

En 1130 Ari Thorgilsson, Ari la Erudiciulo, verkas la Libron de la Islandanoj, malgrandan historion de Islando. Antaŭe li estis partopreninta la ellaboradon de la Landnammabôk, la Libro de la Koloniado, kiu entenis la 400 nomojn de la grupestroj, kiuj koloniis Islandon.

Aĝo de la Sagaoj

La Sagaoj estas tiuj rakontoj, parole transdonitaj de la komenco de la koloniado (870) kaj transskribitaj en la manuskriptojn de la komenco de la 12-a jarcento. Ili rakontas : la eventojn pure Islandajn — la historion de la Norvegaj reĝoj — la historion de la aliaj landoj.

La familiaj kronikoj de la 10-a, 11-a jarcentoj elvokas la vivon de la riĉaj familioj, kiuj instaliĝis en Islando. Hodiaŭ nenio restas de tiuj biendomoj vastaj kaj riĉe meblitaj, kiujn la sagaoj priskribas : la ĉefa loĝejo entenis vastan komunuman ĉambron — tiu de Olaf Höskuldsson povis enteni 900 kunmanĝantojn — Kolonoj el ligno skulptita je runoj, dragonoj unukornuloj subtenis la ĉarpentaĵon ; okcidente troviĝis enirejo por la viroj, oriente, por la virinoj. En la centro, duobla vico da starigitaj slaboj limigis longan fajrejon. Laŭ la vandoj estis litoj, tabloj kaj sur estrado staris la honortablo kaj la ĉefo-trono starigita sur la prapatraj pilieroj. Ĉirkaŭ la ĉefa domo staris konstruaĵoj por la fremdaj vojaĝantoj, staloj, ĉevalejoj, magazenoj kaj la ban-domo instalita apud varma akvo-fonto.

Ne malproksime, sur teramaso estis la templo, la Hof, kies ĉef-pontifiko, la Hofgodi, estis la klanestro. La Hof estis tabua rifuĝejo. La ronda templo havis kupolon kun fenestroj ; ĝiaj muroj estis kovritaj je broditaj ŝtofoj kaj peltoj ; ĝi ŝirmis la statuojn de la dioj ; la pontifika sidilo estis ornamita je najloj, kies rolo estis forĉasi la malbonajn spiritojn ; kupra ujo ricevis la sangon de la viktimoj. Diskonigo de Kristanismo ĉion malaperigis. Apud la Hof staris la Thing, la klana tribunalo.

Pri la Norvegaj Reĝoj raportis Snorri Sturlusson (1171-1241). Li apartenis al potenca familio, la Sturlungs, kiu triumfis super ĉiuj klanoj. En sia Heimskringla, Snorri elvokis la Norvegujan Historion, de Hâlfdan kaj Harald kun Belaj Haroj (9-a jarcento) ĝis Magnus Erlingsson (1177). Estas verko rimarkinda pro sia ekzakteco kaj pro la arto de la komponado. Sturlusson ankaŭ verkis la Sagaon de Egill, kiu estas la biografio de la skaldo Skallagrimsson. Tiuj prozaj mallongaj rakontoj montras personojn zorge individuigitaj kaj precizajn dialogojn. Ili esprimas la moralajn idealojn de tiuj unuaj Islandanoj : verdiremo, fideleco al la donita parolo, kaj precipe la kuraĝo, kiu defendas la honoron de la heroo kaj de lia familio, ĝis murdo aŭ morto.

Kaj de 1200 ĝis 1400 la sagaoj inspiriĝis je la francaj kavaliraj romanoj, tiam tradukitaj en norvegan lingvon. Ili esprimas la belecon, la ĝentilecon de la herooj, la elegantecon kaj riĉecon de iliaj vestoj, la sentimentalan delikatecon de ilia amo. Estas la Sagao de Laxdaela (la loĝantoj de la salmoj-valo) ; la Sago de Grettir, pli malfrua (14-a jarcento). Fine la Sagao de Erik la Ruĝulo. Sed la Sagao de Njala, verkita ĵus antaŭ 1.300, restis tre populara ; ĝi plaĉas al la infanoj ; la libro-amantoj pensas, ke oni devas ĝin legi ĉiun jaron. Aliaj opinias, ke ĝi entenas ĉiujn respondojn de la homa vivo.

Nutrado en la Antikva Egiptujo

En Antikveco, Egiptujo estis fama pro sia agrokultura riĉeco ; ĝi eĉ fariĝis la grenejo de Romo. La pentraĵoj, la skulptaĵoj la hieroglifoj, la papirusoj kaj ankaŭ la nutraĵoj kaj objektoj, trovitaj nedifektitaj en la tomboj, detale informas nin pri tiu nutrado.

Panoj, kukoj kaj platkukoj

Hordeo kaj tritiko estis la bazo de la nutrado, jam en la neolitiko. Oni ilin malkovris en la siloj de Fayoum (el 6 000 ant. K.). Ekzistis diversspecaj tritikoj. Oni pagis impoŝton per tritiko ; unu papiruso parolas pri kamparano, kiu impoŝte ŝuldis 300 tritiko-sakojn ; li opiniis, ke la fisko troigas.

La Egiptoj inventis la panigon. Oni krude pistis la grenon en ligna mortero ; poste per man-muelilo kaj pistilo el dura ŝtono, oni transformis ĝin en fajnan farunon ; oni kribris la farunon ; oni knedis la paston per la mano aŭ per la piedo en potaĵaj kuvoj ; oni aldonis fermenton kaj oni kuiris la paston en varmaj muldiloj, kie ĝi fermentis ; dua kuirado okazis en fornoj ; en Deir el Medineh oni trovis pan-fornojn en pluraj domoj ; en Sudana Nubio (el Mez-Imperio) oni retrovis nedifektitajn muldilojn ; ili estis el terakotaj tuboj, kiuj permesis fabriki « mulditajn baspan-bastonetojn ».

La panoj, permane faritaj, havis plej diversajn formojn : rondajn je 20-centimetra diametro, ovalajn, en formo de vazoj, de ventumiloj, eĉ jen gazelo kun siaj kruroj refalditaj : en sia centro la rondaj platkukoj havis kelkfoje truon por meti konfitaĵon aŭ mielon ; ilia pasto estis bruneruĝaj ; ilia krusto estis brilanta kaj montris grajnojn de hordeo, de spelto, de figoj ; aliaj enhavis dolĉajn figojn aŭ sikomoro-figojn ; aliaj estis farĉitaj je viando. Certe estis ankaŭ platkukoj molaj similaj al niaj krespoj.

Legomoj

Plej ofte oni ilin manĝis krudaj. En Biblio, la Hebreoj elvokas kun sopiro : « Ho ! kia memoraĵo ! la fiŝo kiun senkoste ni manĝis en Egiptujo ! la kukumoj, la melonoj, la laktukoj, la cepoj, la ajloj ! » La tombo de la arkitekto Khâ entenis korbon plenan je ligaĵoj da cepoj. Estis ankoraŭ poreoj, akvomelonoj, kukurboj kaj kalabasoj ; malpli uzataj estis la faboj, la pizoj, la lentoj kaj la kikeroj.

La viando estis larĝe konsumita

La bovaĵo, kies lumbaĵo estis la peco la plej aprecita ; sendube ankaŭ la ŝafo, la kaprino kaj okaze de ĉasoj, la dezertaj bestoj : orikteropoj, gazeloj, antilopoj. Oni ofte manĝis birdaĵojn ; ekster koko kaj kokino, kiun oni ne konis en la faraona periodo oni manĝis anserojn, anasojn, koturnojn, kolombojn kaj aliajn birdojn de la marĉoj. Bredado de anseroj kaj anasoj okazis grandskale kaj multaj scenoj figuras la kropŝtopadon de la anseroj per panbuletoj. Oni boligis la birdaĵojn en marmito aŭ oni ilin stangorostis. La fiŝoj estis larĝe uzitaj de la popolanoj en la « mastabao » de Meydoum figuris giganta Nilo-perko.

La fruktoj

En la tomboj de la metiistoj de Deir el Medineh oni trovis palmo-nuksojn, daktilojn, granatojn, sikomoro-figojn, jujubojn, guŝojn de karolo kaj akacio, nigrajn vinberojn kaj ankaŭ cilindran poton por konfitaĵo.

Mez-Imperio jam konis la dolĉajn figojn ; la Hvksos alportis la granatojn ; la ĉerizoj jam ekzistis en la 2-a dinastio ; la pomarboj originaj el Azio jam iĝis egiptaj antaŭ Ramzes II. Daktiloj estis frandaĵo ; oni ilin manĝis freŝaj, sekaj, aŭ en kukoj.

La spicaĵoj : kumino, koriandro, kaj juniperoberoj venis el Azio.

Ŝajnas, ke la Egiptoj konis nur la buteron likvan ; tamen ili sciis fari fromaĝojn jam de la I-a dinastio ; por kuirado kaj raguoj oni uzis besto-grason aŭ oleon (oleoj de « moringa » kaj « carthame ») ; la oliva oleo estis rara kaj kiam la rikolto estis nesufiĉa oni importis ĝin el Palestino aŭ Sirio. Oni uzis salon ; oni ne konis sukeron kaj uzis mielon ; Ramzes III donacis al la temploj milojn da mielo-ĵaroj.

Konservaĵoj estis jam konataj en la Antikva Imperio. Oni konservis anserojn, anasojn, fiŝojn per sekigado aŭ peklado. La botargo, ia kaviaro, estis la ovoj de la mugiloj, peklitaj kaj fumaĵitaj.

Dum la prifosaĵoj oni konstatis ke la kuirejoj situis ĉiam ĉe oriento por eviti la malagrablajn odorojn ; apude troviĝis la panfarejo kaj la greno-kabanoj, kiuj similis abelujojn ; koridoro kondukis de la kuirejo al la enirhalo, kiu servis kiel manĝo-ĉambro.

La trinkaĵoj

Oni plej komune trinkis akvon sed la listoj de la oferdonoj signalis bieron kaj vinon. Bierfarado estis konata jam en la antaŭ-dinastia periodo ; malgraŭ neesto de lupolo, estis vera biero farita per maltado de hordeo-pano ; tiu biero estis pli forte alkoholigita ol la nia kaj permesis al la Egiptoj ebriiĝi. La vino, konata almenaŭ jam de la 2-a dinastio estis la trinkaĵo de la riĉaj klasoj ; ĝia fabrikado detale figuras en multaj tomboj ; oni konis 6 specojn de vino ; oni kulturis viton precipe en la Deltejo kaj ankaŭ en Memphis (Memfido) kaj en la oazo de Fayoum ; tre aprecitaj, oni lasis ilin maljuniĝi ; la Faraonoj havis siajn proprajn vitejojn por provizi siajn tablojn kaj la funebrajn oferdonojn de siaj propraj tomboj. En la tombo de Toutankhamon la vino-ĵaroj estis el delikata potaĵo kaj sigelitaj per argila korko ; ili montris la kartuŝojn de la reĝo, la daton kaj la nomon de la vito-mastro.



En la kortego ekzistis vin-gustumisto kaj la vin-kelisto havis fido-postenon, jam dum la antikvaj periodoj. Oni regalis la diojn kaj la eksterlandanojn per tiuj bonaj vinoj. Oni trinkis el pokaloj kaj en la 18-a dinastio oni uzis sifonojn faritajn el kanoj rektangule enfiksitaj. La malpli famaj vinoj estis miksitaj. Ekzistis ankaŭ palm-vinoj, suko de palmo, aŭ de daktiloj maceritaj en akvo.

La lakto estis tre ŝatata, jam en la antikva Imperio ; pli ol trinkaĵo ĝi estis frandaĵo ankaŭ por la dioj kaj la mortintoj. Oni metis trinkaĵojn kaj manĝaĵojn sur la altarojn, piede de la statuoj ; post difina tempo, la pastroj kaj la aliaj templo-funkciuloj ilin konsumis.

Manĝoj kaj festenoj

La manĝoj okazis matene, tagmeze, kaj vespere. La teleraroj estis plej diversaj : potaĵaj aŭ ŝtonaj vazoj, ĵaroj por akvo kaj oleo, kruĉoj por la vino, dikaj amforoj por la biero, pokaloj el terakoto, plataj kaj kavaj teleroj.

Oni devas citi la belan servicon de la tri princinoj, favoritinoj de Thotmes III ; la objektoj estas el oro, el arĝento, el vitro, el alabastro, en ora muntaĵo.

En la tombo de vic-reĝo Houy, jen Amenophis IV, la reĝino Nefertiti, iliaj filinoj kaj la princino Tiyi ; la manĝaĵoj abundegas sur la tabloj ; oni manĝas per la fingroj, sen tranĉilo nek forketo ; eble estis kulero por la konfitaĵo. Oni sidis sur seĝoj, sur taburetoj aŭ sur matoj. La virinoj ricevis parfumitajn graso-konusojn por lubriki sian hararon. Oni lavis siaj manojn en speciala pelvo ; la servistoj servis la trinkaĵojn. Muzikistinoj kaj dancistinoj ĉarmis la festenantojn. Povis okazi, ke tro plena stomako bezonis malŝarĝigi ; tio efektiviĝis, digne, antaŭ ĉiuj.

Por la mez-klasaj personoj, la festenoj estis malpli abundaj ; ĉe la popolanoj la manĝoj estis ekstreme simplaj : panoj, cepoj, platkukoj.

Oni devas signali la malsatojn, kiuj okazis, kiam la akvoj de Nilo estis nesufiĉaj ; kiam tio ripetiĝis estis katastrofo.

En Sakkarak oni trovis terure magrajn skeletojn ; kaj ankaŭ mumiojn, kiuj montris perturbojn pro malbonega nutrado.

Kiel Pantagruelo venis al Grezijono por peti helpon

Anonima manuskripto trovita en angulo de la Grezijona biblioteko

Tiam ni alvenis en Anĝovon, kie la somero estis varma, tamen ne regis soifo, ĉar ĝi estas regiono de grandaj kaj bone provizataj keloj ; tiam neniam regas sekeco de gorĝo, kiu estas tre ĝena malsano. Ĉe Anĝevo, Pantagruelo, por amuzi sin, fosis per du fingroj fosaĵon ĉirkaŭ la turoj de la kastelo, kaj tie nun promenas cervoj por la plezuro de la apudloĝantoj. Ni rapide foriris al Baugé, ĉar Pantagruelo havis fidelajn aliancanojn en apuda kastelo, nomata Grezijono. Tie regas grafo Pafiano, kiu gvidas roton el valoraj kaj bravaj kavaliroj, sub emblemo de verda stelo, tial oni nomas ilin kavaliroj de la verda stelo. Ili estas viroj kaj virinoj, kaj vivas en bona harmonio.

Ili akceptis nin afable kaj entuziasme ; tuj portis grandan amason da glasoj kaj boteloj, kaj por mia sinjoro grandan pokalon, kiun ili speciale faris esperante nian viziton ; tiu pokalo nun staras en la granda ŝtuparo de l'kastelo. Ĉar glaso estas tiel ridinda ujo, kiel por ni fingringo por bebo. La Grezijonanoj samtempe malfermis multajn barelojn da blanka kaj ruĝa vino, kaj ekkantis sonore :

« Plenigu la glason ho ĉiu bonul... »

vi scias la ceteron de l'kanzono. Graf'Pafiano bonvenigis kaj gratulis nian majstron per plataj, afablaj, poluritaj, ĝentilaj, plezurigaj vortoj ; sed la septembra kaĉo tiel konfuzigis nian spiriton, ke mi ne povas redoni eĉ la komencon de unu. Ni ankoraŭ sentis la ĉarmon de liaj paroloj, kiam Pantagruelo per milda voĉo — kiu tamen sonis kiel tondro — dankis nian gaston pro lia malavara akcepto, kaj donacis al li memoraĵon. Li diris plu :

« Fidoplena gasto, kaj vi, bravaj kavaliroj, kiel pro-
« funde mi bedaŭras, ke mia vizito okazas en tiaj cirkons-
« tancoj, kaj ke mi tiel mallonge povos ĝui restadon en
« via belega bieno. Mi venis por peti vian lojalan hel-
« pon en la milito, kiun la Dipsodoj trudis al mi. Vi
« scias, kiel kontraŭvole mi marŝas al batalo, kaj ke mi
« domaĝas la suferon de multaj homoj tiel stulte ofera-
« taj al ambicioj de sensentaj estroj ; sed mia popolo
« jam suferis grandan ĝenon pro la invado de la Dipso-
« doj, kaj mi devas ilin helpi en bezono. Tial mi venis al
« vi, miaj lojaluloj, por peti vian spertan helpon en tiu
« danĝera entrepreno, tro bedaŭrante tamen la sangon,
« kiu elverŝiĝos je la okazo. »

Grafo Pafiano respondis tuj, ke lia tuta korpuso, kaj li-mem, korpe kaj anime, estas pretaj helpi sian sinjoron, kaj promenigi la verdan stelon en la plej varmajn lokoĵn de l'batalo, kaj aldonis, ke ĉiuj kavaliroj estas nun tute pretaj por belaj kaj grandaj faroj. Ĉar ili ĵus revenis de ekspedicio kontraŭ la Atistoj, kiuj antaŭnelonge misplugis la kampojn de Esperantujo. Je tio hurais la tuta grupo, kaj glasoj plu kuris, ĉar ĉiuj sentis tre grandan soifon post la parolado de Pantagruelo.

Sed, antaŭ ol pretigi sin por ekmarŝi kontraŭ la malamiko, ili invitis nin al granda bankedo, kaj tuj estis la grandaj tabloj starigitaj.

« Mi trovas tiel strange, subite diris Panurĝo, ke tiuj graciaj, belaj, inde inecaj Grezijonaninoj miksiĝas kun ni, sidas ĉe ni, partoprenas en ĉiuj laboroj viraj je egaleca nivelo ».

« Tio, respondis Pantagruelo, memorigas min pri la kreaĵo de mia glora patro ĉe Telemo ; li volis, ke ĉiuj, viroj kaj virinoj, libere kaj bonmore kunvivu, kaj mi kredas vidi tie-ĉi alian ekzempleron de tiu bela fondaĵo. »

« Apropaŭe, reprenis Panurĝo, ĉu vi scias, kiu mambesto, en unu ulo, kunigas ambaŭ seksojn ? »

« Mi tute ne vidas la rilaton, rimarkigis Epistemo, vi havas, amiko Panurĝo, strangajn apropaŭojn. Kaj mi cetere ne scias la respondon, pri via enigmo. »

« Trinku grandan glason da tiu-ĉi Muskade', kaj ne forgesu ĉi-tiun belan ŝinkon, ĝi estas incitilo bonvina. Ĉu vi nun vidas solvon, eltiraĵon, respondon por ĉi-tiu enigmo ? »

« Mia menso, respondis Epistemo, estas nek klara nek klera pri ĉi-tiu ĉapitro. Donu da klarigo pli en mian glason, mi volas diri klarvino. Ha nun mi vidas, nun mi komprenas, nun mi estas ravita. Ĝi estas ja gepardo, klare, kiel pipsuko ! »

Dum tiuj afablaj diskutadoj, pasis manĝaĵoj pli bonaj unuj ol la aliaj, jen trutoj, jen ezokoj, jen perkoj, jen perĉoj, jen gobioj, jen salmoj, jen angiloj, jen alozoj, jen gurnardoj, jen trigloj, jen skorpenoj, jen kobitidoj, jen lojtoj, jen skombroj, jen merlangoj, jen merlučoj, jen moruoj, jen gadoj, jen tinusoj, jen ekinoj, jen ostroj en konkoj, jen mituloj, jen omaroj, jen palinuroj, jen langustoj, jen salikokoj, jen kraboj, kaj ĉe tio prezentiĝis barele vinoj de Muskade', dikplanta de Nantes, de Pouilly, de Fuissé, de Graves, de Saumur, kaj multaj aliaj lokoj, kaj trinkaĵo mankis al neniu.

Tiam oni alportis viandaĵojn el

cervo	cervido	boaco
kapreolo	damao	tragelafo
sovaĝa porko	kulturporko	ŝafo
ŝafido	bovo kamarga	bovido
leporo	kuniklo	koko
kokido	ĉevalo (sed kelkaj tion ne ŝatis)	
numido	fazano	meleagro
galinulo	tetrao	tetrako
glareolo	turdo	kolombo

jen stufitaj, jen frititaj, jen risolitaj, jen rostitaj, jen kradumitaj, jen raguaj, kun saŭcoj mustarda, burgunda, krema, cepa, funga, roberta, aŭrora, bearna, holanda, angla, kaj pli amuzaj kaj agrablaj kombinaĵoj. Kaj estis servataj samtempe legomoj en senfina varieco.

Kaj tiam ĉiuj ĉe la tablo fervore

mordis	rodis
maĉis	rojnis
detiris	ronĝis
fosis	varpis
tranĉis	voris
hakis	vipis
tiris	vomis
ŝtopis (la ventrajn truojn)	
kraĉis	reprenis saŭcon
raspis	tusis
tordis	grumblis
lekis	grimacis
viŝis	rompis la ostojn kaj de tie medelon forglutis.
ŝprucis	ruktis

kaj ĉefe trinkis ade vinojn el Mâcon, Beaune, Bourgueil, hospitaloj de Beaune, Vougeot, Chorey, Morgan, Julienas, Saint-Amour, Nuits-Saint-Georges, Puligny, Montrachet, Romanée, Vosne, Saint-Junien, kaj multaj aliaj. Kaj estis bela spektaklo de la moviĝantaj mandibloj.

Post la viandoj venis fromaĝoj : kamembertoj, furmoj, tomeoj, briaĵoj, kantalaĵoj, grujeraĵoj, Avesnes'aj buletoj, Brillat-Savarin, kaprinkakoj, pipritaj, herbumitaj, kaj tiel plu, kaj re vinoj.

Kaj tiam venis kukoj, tortoj, klafutoj, pudingoj, flanoj kun vinoj el Bergerac, Montbazillac, Sauternes, Graves, krutaĵoj de l'Loire, le Layon, kaj estis granda ĝojo kaj vorado.

Kaj tiam serviĝis likvoroj kaj brandoj, verbenaj, konjakaj, juniperaj, prunaj, grenaj, prunelaj, ĝino, advokatajo, viskio, tiel, ke el ĉies buŝoj oni povis fari grandan flamon, kaj estis mirinda ĝojo.

Kiam ne plu estis timo pro ventrofaldoj — kio estas terura kaj kripliga malsano — la Grezijonanoj komencis siajn ludojn. Ili konas nur unu, tio estas fiko, sed ili eltrovis mirindan nombron da variajoj, nome

profiko	fiko
perfiko	refiko
senfiko	trofiko
difiko	defiko
mirifiko	dufiko
luksefiko	trifiko
reefiko	ktp
edifiko	efiko
pacifiko	trafiko
fikolego	mistifiko
prefiko	
fikariĝo	

kaj tiel finiĝis la vespero. Ni ricevis niajn litojn, krom Pantagruelo kiu estis tro granda por dormi en la kastelo, kaj devis ripozi ekstere.

Ni ĉiuj dormis bone, krom Pantagruelo, kiu pro la pezo de sia korpo formis grandan truon, kiun tuj invadis akvo ; kaj ju pli li puŝis sin, des pli grandan lagon li formis ; tiel ke li fine ekstaris, kaj vidis, ke li en kelkaj horoj da ripozserĉado formis rondan lageton. Tiu-ĉi formo ne tre plaĉis al li ; tial li degratis iom da tero apude, el kiu li formis insulon ; en la apuda truo, sin banas de nun la gegrezijonanoj...

Sur la honor-kampo

Jill simple diras al si : « ci estis sufiĉe freneza por ŝin provoki, nu, ci devas iri ĝis la fino ».

Ja, ŝi malmulte manĝas dum la vespermanĝo kaj ŝi estas terure pala. La patrino de Jill ne multe atentas ŝin ; ŝi nur kontrolas, ke la loĝejo estas perfekte pura por akcepti, hodiaŭ vespere, ŝiajn amikinojn, kiuj venos por la semajna bridĝo ; tamen ŝi diras : « Vere, Jill, ci ne havas bonan mienon ; ne malsaniĝu hodiaŭ vespere, tio ĝenos mian kunvenon.

— Ne timu, mi bone fartas, respondas la junulino.

Trankviligita la patrino ekridas : « Ha ! sendube la spleno ! estas je cia aĝo, mi konis tion ! »

Jill ne respondas kaj eltabliĝas ; ŝia patro forestas : ankoraŭ unu el liaj senĉesaj afervojaĝoj ! Ŝi eniras en la kuirejon ; ŝi malfermas la tirkeston de la tablo kaj prenas du skatolmalfermilojn ; ŝi ilin ne rigardas sed, kiam ŝi supreniras al sia ĉambro, ŝi sentas sian polmon iĝi ŝviteta kaj brula ; ŝi demetas la jupon kaj la puloveron, kiujn ŝi surmetis por iri al la kinejo, kie la kverelo komenciĝis ; ŝi duŝas sin kaj zorge vestas sin per pantalono kaj sporta bluzo ; ŝi kombas siajn longajn harojn kaj tiras ilin malantaŭen por fari ĉevalvoston ; sed ŝi pensas, ke tiu ĉeval-vosto estos tro facila preno kaj ŝi preferas har-tuberon forte strečitan ; ŝi metas la skatolmalfermilon en sian poŝon kaj malsupreniras.

— Jill, kien ci iros hodiaŭ vespere ?

— Al la junul-domo ; ni iom dancos.

— Tre bone, ne faru stultaĵojn ; mi estas tre kontenta, ke tiu junuldomo ekzistas ; mi estas trankvila, kiam ci estas tie kun ciaj kamaradoj.

— Mi revenos ne tro malfrue, respondas Jill.

Ŝi laŭsekvas la straton borderitan je arboj kaj freŝaj herbejoj, ĉio estas paca ; la roza ĉielo anoncas la krepuskon. Iom pli malproksime Telma ŝin atendas.

— Mi ne kredas, ke ci estas tiom kuraĝa, Jill, mi estis certa, ke ci ne venos ; ĉu ci havas la skatol-malfermilojn ?

— Mi havas ilin, diras Jill ; ŝia voĉo estas firma sed ŝi pene glutas ; « mi volas ŝminki min ; mia patrino ne ŝatas tion kaj mi atendis esti ekster la domo » ; ŝi ekcese, preskaŭ groteske, ŝminkas sin.

— Tiel, estas multe pli bone, diras Telma, ci estis iom pala ; ĉu ci timas ?

Jill levas sian etan rondan mentonon :

— Certe mi timas ; sed ne maltrankviliĝu ; ĉio bone iros.

— Pri tio mi estas certa ; ci forregalos tiun aĉulinon Roksana ; de longe ŝi tion serĉas ! Ha, mi forgesis diri : John kaj du liaj kamaradoj trovis aŭtomobilon ; ili estos tie ; ili foriros kun la gajnantino.

— Ĉu vere ? Jill sentas vertiĝon leĝeran. John kaj liaj nigraj, maltimaj, ridantaj okuloj, lia oblikva rideto ; li estas preskaŭ 20-jara. Nepre necesas, ke ŝi honore elsaviĝu el tiu afero ; ŝi devas montri al John, ke kvankam pli juna ol Roksana, ŝi estas pli forta ol ŝi.

Nune preskaŭ tute noktiĝis. Jill kaj Telma transpaŝas la pordon de la atleta korto. Roksana kaj Nita jam alvenis ; ankaŭ la knaboj. Jill ĵetas rigardon al Roksana, al ŝia granda buŝo, al ŝiaj mamoj tro dikaj, al ŝiaj masivaj femuroj, kiuj streĉas la ŝtofon de la pantalono. Jill frostotremas sed tamen ŝvitas. Telma diras al ŝi : « ne forgesu, celu la mamojn, onidire tio estas tre doloriga ; unu nura frapo kaj ci estos trankvila ; estos finite ; sed atentu protektu la ciajn !

Jill nekapabla paroli skuetas la kapon ; tamen ŝi konstatas, ke ŝiaj gamboj estas malpli molaj ; ŝi rigardas al la knaboj ; ili estas tri ; John sidas sur amaso de bariloj ; la knaboj ne parolas ; ili rigardas la knabinojn kaj fumas tenante sian cigaredon en la kavo de sia mano.

Nita estas malgranda kaj maldika ; ŝi ĵetas, per strida voĉo : « Ambaŭ, aŭskultu min : estas malpermesate frapi ĉe la vizaĝo ; oni ne volas, ke iu, poste, faru stultajn demandojn ! Ĉu vi estas pretaj ? »

Jill kaj Roksana estas vid-al-vide ; en iliaj manoj la skatol-malfermiloj feble lumas ; la du knabinoj komencas rondiri kun malfido.

Subite Roksana longiĝas kun la brako etendita ; Jill malantaŭen saltas sed la skatol-malfermilo de Roksana ĵus entranĉis la suprajon de ŝia mano, kiun ŝi metis sur sia brusto. Jill rigardas la longan tranĉon, disŝiriton, kaj sangan ; kaj subite ŝi sentas la doloron.

Bruske la kolero flamas en ŝi kaj ŝia tuta korpo koleras. Denove Roksana sin ĵetas kontraŭ ŝin ; Jill havas nur unu nuran deziron : ŝiri la karnon de la alia, ŝin kripligi ; ŝi estas nur nodo de doloro kaj fraŭdiĝo... ŝi vidas, ŝi sentas, ke ŝia armilo mordas la dikan vangon de Rokasa kaj samtempe neimagebla ĝojo kaptas ŝin ; ŝi aŭdas Nita hurli : « Estas kontraŭ-regule ; ŝi celis la vizaĝon ! pagigu ŝin, Roksana ! ».

Roksana retroiras ; ŝi pasas sian manon sur sia vango kaj rigardas siajn sangajn fingrojn... Forĵetante unu el siaj skatol-malfermiloj, ŝi sin ĵetegas sur Jill. Surprizita Jill plenvizaĝe ricevas du pugnofrapojn ; ŝi tuj kontraŭatakas ; ŝia armilo ŝiras la bluzon de Roksana ; blanka haŭtopeco brilas kaj tuj ruĝiĝas je sango.

Tiam Roksana sin ĵetas sur Jill kaj malliberigas ŝiajn brakojn. Neniam Jill spertis tian furiozon kaj tian forton. Per pied-preno Roksana faligas Jill, tiel bruske, ke Jill apenaŭ povas spiri. Nun Jill estas inter ŝiaj genuoj ; ŝi sentas ion kiu plugas ŝian vizaĝon ; ŝi sufokas ; ŝi bezonas vomi ; tra ia nebulo ŝi fine vidas, ke la aliaj tiras Roksanan malantaŭen. Estas nur kiam ŝi pene restariĝas, ke ŝi konscias, ke sango fluas en ŝian buŝon ŝtopante ŝian gorĝon, kaj ke unu el ŝiaj okuloj distingas nur ian ruĝan nebulon ; per la alia okulo ŝi ekvidas Roksanan ; tiu ĉi ne piu moviĝas ; unu el la knaboj ne ĉesas ripeti « Sinjoro mia Dio ! Sinjoro mia Dio ! » Jill tuŝas sian dekstran okulon sed la tuŝo estas tiel horora, ke ŝi rapide formetas sian manon ; kiam ŝi estas kompreninta, ĉio, en ŝi, ŝajne solviĝas. En la sama momento la voĉo de John frapas ŝiajn orelojn « Pli bone estas konduki ŝin en hospitalon » li diras ; « ĉu ci estas freneza, respondas Nita ; por ke oni faru al ŝi mil demandojn ! por ke oni kaptu nin ! »

« Ni konduku ŝin al ŝia domo ; ŝiaj gepatroj flegos ŝin ; certe ŝi nenion diros ».

— Mi ne parolos, diras Jill, kaj ŝi svenas.

Oni metas ŝin en la aŭtomobilon de la knaboj...

Ili haltas, kun ĉiuj reflektoroj estingitaj. Ili portas Jill sur la herbejon, sub siringo.

Kaj haste ili enveturiĝas, klakigas la pordojn longe hupas, kaj rapide foriras.

En la domo la patrino de Jill kaj ŝiaj amikinoj levas la kapon ; la patrino sopiras : « Sendube estas mia filino, kiu revenas pli frue ol antaŭvidite ; tiuj gejunuloj havas neniajn prizorgemojn pri ni ; ŝi povus resti ankoraŭ momenton en sia klubo ; ŝi bone scias, ke ni bridĝas hodiaŭ vespere ; nu, ke ŝi iru al sia ĉambro kaj tie restu.

Ŝi faras novan disdonon.

Momenton pli poste estas gratado ĉe la pordo, kvazaŭ besto dezirus eniri en la domon. Tiuj damoj ŝajnigas esti surdaj, ĝis fine la patrino furioze ĵetas siajn kartojn sur la tablon kaj leviĝas dirante : « Tiuj junuloj volas tedi nin ; ili volas timigi nin ; aŭ eble mia filino forgesis siajn ŝlosilojn ; sed ŝi povus sonorigi aŭ ekfrapi, kiel ĉiu ajn ».

Ŝi malfermas la pordon ĵus kiam Jill denove tuj ekgratos ĉe la pordo per la skatol-malfermilo, kiun ŝi ne ellasis.

Dum unu sekundo, la patrino de Jill rigardas la knabinon, kiu tere kuŝas ; ŝi rigardadas la ruĝan maskon, kie io horora troviĝas ĉe la okuloloko...

Ŝi rigardadas antaŭ ol kompremi pri kio kaj pri kiu temas.

TOTALA GREFTO

La Profesoro Marek estis fama kirurgo, kiu, la antaŭan jaron, savis eminentan miliardulon. De tiam, sekrete, tiu ĉi, mone, helpis liajn serĉojn kaj provojn. Verdire, kio plej multe interesis la Profesoron estis praktiki greftojn ; ĝis nun, plensukcese, li estis greftinta — nur sur hundoj — membrojn, hepaton, koron kaj eĉ kapon. Li multe deziris praktiki greftojn sur homoj.

La cirkonstancoj montriĝis favoraj ; en tiu libertempa periodo la gravaj akcidentoj estis multaj. En interkonsento kun la aŭtoritatuloj, Marek petis de la ĝendarmoj, ke ili alkonduku al lia kliniko la vunditojn, kiujn nur grefto povus savi.

En interkonsento kun la Direktoro de la Malliberejo, oni prokrastis la ekzekuton de Rene Meril, 28-jara, kulpa je enrompanta ŝtelo kaj mortigo de du policistoj. Enkarcerigita, Meril sincere pentis kaj dediĉis sian korpon al la Scienco. Marek vizitis lin kaj Meril akceptis, ĝoje, ke la Profesoro uzu lian korpon por praktiki greftojn kaj redoni vivon al agoniantoj.

En tiu ĉi dimanĉo oni alkondukis al la kliniko sep vunditojn. Ili estis : Sro Olivero, 30-jara, maldekstrula pentristo ; malfeliĉe estis lia maldekstra brako, kiu estis elŝirita. La Pastro Leviro, 45-jara, kiu perdis sian dekstran brakon. S-ino Galara ne nur vidviniĝis pro la akcidento sed ŝia maldekstra gambo estis tute premegita. S-ro Jumareze, 31-jara, direktoro de privata lernejo, havis pelvon tute kavigitan. S-ro Eramire, 40-jara, estro de granda uzino, ne plu havis dekstran gambon. S-ro Roĝero, 22-jara, studento, preskaŭ ne plu povis spiri ; lia brusto estis nur sanga vundo. S-ro Nerise, 34-jara, banko-oficisto, forĵetita ekster la aŭtomobilo, havis danĝeran kraniofrakturon.

Dum la nokto oni flegis la vunditojn ; oni ilin preparis por ricevi la bezonatan grefton.

Rene Meril estis gilotinata la lundon frumatene. Per gipso-bandaĝo oni zorge fiksis la kapon al la korpo, por ke la histoj ne difektiĝu. Oni plej rapide kondukis la ekzekutiton al la kliniko en ambulanco, antaŭata de motorbiciklistoj.

Dum la tuta tago kaj la tuta nokto la kirurgoj operaciis. Marek mem greftis la kapon de Meril al Nerise kaj lian pelvon al Jumareze.

36 horojn pli poste la sep vunditoj ŝajnis savitaj. En la okuloj de Marek brilis ĝojo, fiereco kaj espero. Estas Nerise, kiu plej interesis lin : li normale spiris, li povis gluti, li malfermis la palpebrojn, li komprenis kion oni diris al li ; lia kora ritmo estis bona ; metala aparato firme entenis lian kapon kaj liajn ŝultrojn. El la bandaĝo oni vidis nur liajn okulojn, liajn sekajn lipojn kaj la pinton de lia nazo.

Jumareze kaj Roĝero estis iom komataj kaj enormaj vitraj ampoloj alkroĉitaj al pendigiloj transdonis al ilia sango specialan serumon.

Estas la Pastro, kiu plej rapide resaniĝis. Li estis gaja ; tamen tiu nova dekstra mano, kiun li vidis ekster la splinto, turmentis lin. Al kiu antaŭe apartenis tiu dika mano ? tiuj duraj ungoj ? « Certe, li pensis, mi metos ganton por fari mian meson ». Olivero la maldekstrula pentristo, diris « Jam, antaŭe, mi ne sukcesis vendi miajn pentraĵojn. Nune, kiom mi povos fari ! » S-ino Galara, malbone kombita, sen ŝminko, kun fermitaj okuloj, nenion diris ; ŝi maltrankviliĝis pri tiu vira gambo, tiu muskola, haraĵa gambo. Eramire parolis nur pri asekuro kaj kompensaĵoj. Nerise pli kaj pli reviviĝis ; li prononcis kelkajn vortojn : « Averti la bankon ». Ha ! rimarkis la Profesoro, liaj propraj zorgoj instaliĝas en lian novan cerbon. Ja, estas la sango, kiu entenas niajn kutimojn, emojn, dezirojn. La juna Roĝero pli kaj pli malgrasiĝis ; li turmentiĝis pri siaj ekzamenoj.

Tamen la resaniĝantoj pli kaj pli bonfartis. La pastro iris de ĉambro al ĉambro por ilin kuraĝigi. Iun vesperon ĉiuj kunvenis en la salono kun Marek kaj la kirurgoj. Kiam Marek forprenis la bandaĝojn ĉiuj zorge ekzameniĝis. Eramire rimarkis, ke lia nova dekstra femuro portis strangan cikatron, ŝajne kuglo-cikatron ; ĉu gambo de gangstero ? La pentristo havis sur sia maldekstra brako elokventan tatuon. Jumareze faris la kalkulon : du gamboj, du brakoj, unu vira ventro, unu brusto, unu kapo ! Sed estas tuta viro ! Kiu li estis ? Marek estis devigata konfesi la veron ! Ja, li povus ŝanĝi brakon, gambon ... Sed neniu deziris alian grefton. Marek petis de ĉiu la sekreton. La eksperimento estis ankoraŭ ne konita de la ĵurnaloj kaj de la publiko ; oni ĝin konigos, kiam la rezultoj estos pli certaj.

Ĉiu reprenis normalan vivon kaj ĉiusemajne ili renkontiĝis en la kliniko. Ilia fizika stato estis kontentiga sed psikaj problemoj stariĝis.

S-ino Galara estis konfuzita ; ŝi sentis sin sklavino de tiu vira gambo ; sencese ŝi ĝin tuŝis, karesis ; ŝi rifuzis kovri ĝin per ina ŝtrumpo kaj kun bedaŭro kaŝis ĝin en pantalono. Jumareze multe ŝanĝigis ; krudaj apetitoj naskiĝis en li ; li sencese manĝegis ; sed pli grave, seksaj apetitoj turmentis lin ; li estis deloginta, en sia lernejo, junan lernantinon kaj ne plu sciis kiamaniere elsaviĝi el tiu situacio. Eramire miris pri tiu gambo, kiu piedbatis ĉion, kion ĝi renkontis : ŝtonon, ledskatolon, paperbulojn ; antaŭe li ne kutimis je tiaj bubaĵoj ! Kaj li sentis grandan deziron : li volis edziĝi kun S-ino Galara ; tiamaniere li posedus la du gambojn de Meril. Roĝero ne plu studis ; dank'al siaj novaj pulmoj kaj koro, li plej lerte saksofon-ludis kaj li estis organizanta, kun du kamaradoj, malgrandan orkestron ; Eramire proponis al li pruntedoni monon por ke ili registru diskojn ; baldaŭ, por Roĝero, sukceso

kaj riĉeco ! Olivero pli kaj pli drinkis ; antaŭe li faris nur marpentraĵojn ; nune el lia peniko eliris nur krud-koloraj makuloj kaj ondaj linioj ; tamen tiu nova stilo plaĉis al la publiko kaj galeriodirektoro proponis al li organizi grandan ekspozicion. « Estas hide, diris Olivero, sed sensacie ! ». Nerise bone fartis, sed liaj nigraj, ridetantaj kaj mokemaj okuloj ĝenis la aliulojn ; rapide oni rigardis alien.

Subite kvazaŭ epidemio okazis.

Iun tagon, Jumareze ne venis al la vespera kunveno. Marek tuj rapidis ĉe li ; li estis ĵus mortiginta sin per revolvero ; rapide la Profesoro kondukis lin al kliniko sed la malfeliĉulo mortis dum la nokto. Liaj kamaradoj kondukis lin al la tombejo, krom Nerise, kiu suferis je kapdoloroj. La Pastro fervore preĝis por ke ĉiu bone elportu sian elprovon.

S-ino Galara pli kaj pli malĝojiĝis ; Marek donis al ŝi trankvigilojn kaj ĉiumatene telefonis al ŝi ; iun matenon ŝi ne respondis ; ŝi estis glutinta, en unu fojo, la tutan dormigilon. Marek ne sukcesis ŝin revivigi ; en la tombejo ŝiaj kamaradoj — krom Nerise ĉiam suferanta — longe meditis.

Kelkan tempon pli poste okazis la ekspozicio de Olivero. Eĉ Nerise, pli bone fartanta, ĉeestis ĝin por partopreni la ĉiesan ĝojon (Tamen kun barbo kaj okulvitroj por ke la ĵurnalistoj ne rekonu la vizaĝon de Meril). Tiu ekspozicio havis grandan sukceson : multaj admirantoj ! multaj aĉetantoj ! Tamen Olivero hontis pri sia pentraĵo ; li ne volis montriĝi al la publiko kaj restis en apuda ĉambro. Kiam Nerise venis al li por lin gratuli, li trovis lin agonianta, kun revolvero ĉe mano.

Marek rapidigis lin en sian klinikon, ĉar lia koro ankoraŭ batis. Ve ! Li ankaŭ mortis dum la nokto. La Pastro preĝis por la malaperintoj ; li provis klarigi, ke la morto-deziro de la pentanta Meril estis eniĝinta en la « Ricevintojn » kun ĉiu parto de lia korpo. Eramire kaj Roĝero devis plej atente zorgi sin.

Tamen la morto de S-ino Galara estis multe impresinta Eramiren ; tiu ĉi pli kaj pli malbonhumoriĝis. Li malpaciĝis kun Roĝeron kaj decidis, ke li ne pruntedonos monon al li por registrado de liaj diskoj. Roĝero respondis per aĉaj paroloj. Eramire sentis sin terure sola : S-ino Galara rifuzis lin kaj Roĝero insultis lin ; unu vesperon oni trovis lin mortanta kun revolvero apud li. Roĝero diris : « Estas mia kulpo ! mi lin insultis ! « Dum la flegistoj transportis Eramiren en la ambulancon, Roĝero prenis la revolveron kaj trapafis sin. Marek ne povis sufiĉe rapide interveni. La ambulanco transportis la du malfeliĉulojn al la kliniko ; ambaŭ mortis.

Nerise malbone eltenis tiujn mortojn ; li pesimisme parolis kun la Pastro « Pastro, ni baldaŭ mortos ; dum monatoj mi suferis en miaj membroj, en mia ventro, en mia brusto ; nune mi malpli sentas ilin, estas mia dekstra mano, kiu ĝenas min ».

Marek tute ne maltrankviliĝis pri Nerise ; li estis certa, ke li baldaŭ tute resaniĝos. La Pastro ne same opiniis ; ili ofte interdisputis. Marek riproĉis la Pastron : « Viaj skrupuloj, viaj paroloj pri la morto turmentas Nerisen. Mi ne plu volas, ke vi vizitu lin ! ». « Konsentite respondis la Pastro, morgaŭ mi foriros el la kliniko, kaj neniam revenos ».

Tamen dum la nokto la Pastro eniris en la ĉambron de Nerise por lin adiaŭi. Tiu ĉi dormis ; ĉar estis varme li estis forpuŝinta la littukon kaj la Pastro malkovris la Veron !

Sur la maldekstra brako de Nerise jen la tatuo de Olivero ; sur lia dekstra gambo jen la kuglo-cikatro de Eramire kaj ĉirkaŭ la kolo, ĉirkau la ventro, ĉirkaŭ la membroj jen freŝaj cikatroj de novaj greftoj.

La Vero estis monstra. Konservante la kapon de Nerise-Neril, Marek estis greftinta, post ĉiu sinmortigo, ĉiun korpo-parton (kiu en la komenco apartenis al Meril). Mankis nur la dekstra brako... la brako de la Pastro.

La morgaŭan matenon la flegistoj trovis la Pastron pendumita ĉe la espagnoleto de la lia fenestro ; lia dekstra brako mankis.

En la ĉambro de Nerise estis du kadavroj : Nerise kaj Marek. La dekstra ŝultro de Nerise sangis : nova brako estis ĵus greftita.

Apud Marek, bileto ĉion eksplikis : « Estas mi, Marek, kiu, per revolvero, mortigis Jumereze, Olivero, Eramire kaj Roĝero ; mi donis al S-ino Galara mortigan dormigilon ; mi pendumis la Pastron. Post la lasta grefto mi mortigis Nerisen : li ne plu estis Nerise ; Meril delonge estis gilotinita.

Mi ĝojas : mi efektivigis totalan grefton. Mi mortigas min post tiu plena sukceso ».

AL NIAJ LEGANTOJ

Sin ŝovis en la lasta numero de la revuo teksto, kiun ni konsideris ne publikebla. (La IIa letero de Mihai Eminesku).

Mi bedaŭras tiun eraron.

POR VIA DISTRO

SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

La urbestro kaj la policisto

2450 = 2 x 5 x 5 x 7 x 7

Estas 11 grupoj da nombroj kiuj donas 2450 :

2	x	5	x	245	sumo :	252,	duonsumo :	126
2	x	7	x	175	»	184,	»	92
2	x	25	x	49	»	76,	»	38
2	x	35	x	35	»	72,	»	36
5	x	5	x	98	»	108,	»	54
5	x	7	x	70	»	82,	»	41
5	x	10	x	49	»	64,	»	32
5	x	14	x	35	»	54,	»	27
7	x	7	x	50	»	64,	»	32
7	x	10	x	35	»	52,	»	26
7	x	14	x	25	»	44,	»	22

Nur la duonsumo 32 aperas dufoje. Do la aĝo de la urbestro estas 32 jaroj ĉar por ĉiuj aliaj aĝoj li ne estus hezitinta. Do la aĝoj de la tri personoj estas :

ĉu 5, 10, 49, ĉu 7, 7, 50 jaroj.

La plua indiko de la policestro pruvas ke li estas 50 jaraĝa kaj la aĝoj estas 5, 10, 49 jaroj. Se la policestro estus pli ol 50 jaraĝa aŭ malpli ol 50 lia indiko ne estus doninta solvon.

Enigmo

La trovotaj vortoj estis :

ŝelo	ŝelKo
mano	manIo
paro	parUo
pulo	pulVo
tempo	tempIo
salo	salVo
alo	alOo
luko	lukSo
pino	pinTo
irido	iridIo
revo	revUo
valo	valVo
lamo	lamIo
rano	ranDo
halo	halOo
uro	urSo

El la 16 literoj aldonitaj, vi povis trovi la jenan frazon :

KIU VIVOS, TIU VIDOS


NOVA PROBLEMO

Krucvort-Enigmo

Atentu : (r) = nur radiko !

Horizontale : 1. plus 13. La plej grava esperantista evento en la nuna jaro. 2. monato (r) ; vokalo ; trakti per manĝaĵo kaj trinkaĵo (r). 3. infanoj ; longa rakonto. 4. sovaĝa besto (r) ; verdejo en dezerto (akuzativo) ; parto de la buŝo (r). 5. persona pronomo ; konsonanto ; laŭtvoĉe venigi (r) ; vokalo ; duona kapo. 6. vokalo ; konforma al tradicia doktrino ; konsonanto. 7. numerala adverbo ; vokalo ; interna organo. 8. konsonanto ; libro de la Nova Testamento (pri la mondpereo) (r) ; konsonanto. 9. sufikso de inklino ; vokalo ; orda numeralo ; konsonanto ; refleksiva pronomo. 10. prefikso ; kolonforma turniĝanta akvoamaso (r) ; numeralo. 11. moka dirmaniero ; remi per unu remilo. 12. latina esprimo (« al la afero ! ») ; konsonanto ; rondforma spektaklejo.

Vertikale : 1. apudborda lageto neprofunda ; rilata al scienco pri la konsisto de la materiaj substancoj. 2. vidiĝi elveni ; konsonanto ; en unu el la semajntagoj (adverbo). 3. ekzotika armilo (r) (aŭ : duona kristalo) ; valormetala ; optika instrumento tuba (r). 4. percepti per la okuloj (r) ; malsano ; negacio. 5. planto liveranta laksigilon ; trinkaĵon ; sento kaŭzata de minacanta danĝero. 6. konsonanto ; unu el la grandaj Sunda-insuloj ; muskola korpa organo ; konsonanto. 7. numeralo ; ĉiela zono kun la 12 stelaroj ; negacio. 8. vokalo ; ŝtonego ; lumigilo (r) ; konsonanto. 9. kapvesto de reĝo (r) ; eligi laŭtajn voĉsonojn (r) ; fama komponisto. 10. disĵeti grajnojn (r) ; libera de mikroboj (r) ; rilata al plej alta supernatura estaĵo. 11. tutsana (r) ; pordmalfermilo (r) ; meti en likvaĵon (r). 12. subita teruro (r) ; vokalo ; teksaĵo el delikata brila fadeno. 13. kuracisto aplikanta kuracadon kontraŭan al homeopatio ; arbo.



GRAMATIKO PER BONHUMORO

I - KRONOLOGIA TEMPO ; DATO : oni uzas.

1) **Prepozicion** (EN — ĈE — JE)

— en la tria de majo, ĉe sunsubiro, li foriris,
— en lundo matene, je la oka. okazis la akcidento.

2) **Akuzativon**

— li naskiĝis la trian de majo
— lundon matene, li mortigis pro akcidento.

RIM. Post ESTI, oni uzas nek propozicion, nek akuzativon

— estas la tria de majo ; estis frumatene, kiam li foriris.

II - LA AGO OKAZAS ANTAŬ AŬ POST LA MOMENTO DE PRECIZA EVENTO

Antaŭ montras intecon : li alvenis antaŭ la edziĝo.

Post montras ontecon : li foriras post tritaga restado.

Komplekso pri supereco aŭ malsupereco ?



— Je nia foriro kaj plurfoje dum nia vojaĝo mi petis de vi, ke vi cedu al mi la stirradon. Mi certigas al vi, ke, post tre mallonga momento, mi nepre bezonos malstreĉigi... mi tute ne scias kiamaniere...

Vira nekomprenemo



— Ho ! mia karulo. Kial vi tiamaniere nervoziĝas ? Vi ne sufiĉe taksas mian sindonemon ! Tutan horon ni serĉis park-registrilon paneantan !



Infana prizorgemo



— Panjo kara, hodiaŭ estas cia naskiĝtago. Por plezurigi cin mi decidis fari Bonan Agon. Mi interŝanĝis la ranojn, kiuj vi ne amas, kontraŭ tiu krokodileto, kiu povos dormi la tutan tagon en nia banujo.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (3 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.)

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (430 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (4000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Jones R. Kent, 3318 N. Lake Shore Drive, nº 801, CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respond kuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier — Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 6 de 1977, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Vous pourrez lire dans ce numéro le compte rendu de la dernière réunion de notre Conseil d'administration. Le programme des activités pour 1978 a été établi et nous attendons dès maintenant les inscriptions. Les demandes de renseignements arrivent déjà. Le Conseil d'administration a également approuvé les travaux d'aménagement de deux salles de cours.

Le Conseil d'administration a pensé qu'il était opportun de rappeller une fois encore que les statuts de la Maison Culturelle en font un organisme totalement indépendant de toutes les organisations sans distinction. Le Conseil d'administration remercie les associations, les fédérations, les groupes qui ont rappelé dans leurs bulletins ou dans des quotidiens régionaux que la M.C.E. avait cette année 25 ans. Elle leur demande, pour éviter toute confusion, de ne pas oublier d'ajouter aux adresses données celle de la Maison Culturelle Espérantiste, surtout lorsque celle-ci constitue le thème principal ou unique de l'article. Il est souhaitable, également, que les organisations espérantistes, en tant que telles, trouvent le chemin de « leur » maison pour y organiser des stages.

Il a également été question d'examens et de cours. A chaque séjour, les personnes intéressées pourront se présenter à l'un des examens de l'Institut Français d'Esperanto. Mais il existe une ambiguïté dans ce domaine, ambïguité qui tient au fait que les cours s'adressent, à Grésillon, à un public international, et les examens de l'Institut Français d'Esperanto à un public essentiellement de langue française, les épreuves comportant des traductions. Les cours ne peuvent donc pas être une préparation directe, plus ou moins bachotée, des examens. D'autant plus que le but d'un examen est de constater un acquis, c'est-à-dire un passé et non pas de déterminer un avenir et peut-être du même coup le limiter. L'avenir, c'est pour chacun une connaissance et une pratique de plus en plus vastes, mais aussi de plus en plus précises de la langue. Le cours doit être fait en fonction de cet avenir, et le professeur ne peut le faire qu'en esperanto. La préparation aux épreuves de traduction des examens de l'I.F.E. se fait avant, par un cours par correspondance, ou en dehors du cours proprement dit.

D'autres sujets ont été débattus. La tâche des organisateurs et des professeurs est rendue difficile par la diversité des motivations des personnes qui ont choisi de passer un temps plus ou moins long à Grésillon. Mais il ne peut être question d'édicter des règles. Nous nous en remettons à la bonne volonté et à la compréhension des stagiaires pour qu'ils s'inscrivent si possible pour un séjour complet, pour qu'ils suivent en grand nombre les activités offertes par le programme, et en particulier les activités collectives, pour que, s'ils ont choisi de passer des vacances à Grésillon, ce soit vraiment parce que, là, ils ont la grande chance de pouvoir pratiquer la langue.

P. BABIN.

Inter Ni

Krom la preparado de la venontjara programo nia konsilio aprobis la aranĝon de du remizoj en kursoĉambrojn. Ĝi insistis pri la fakto, ke la Esperanto-domo Gresillon estas tute sendependa de ĉiuj aliaj esperanto-asocioj kaj pro tiuj estas malfermitaj al ĉiuj. Estus bone, ke tiuj asocioj trovu la vojon al Gresillon kaj organizu tie siajn proprajn aranĝojn ? Kompreneble ankaŭ la eksterlandaj asocioj. La konsilio konstatis, ke tro ofte en la kursoj la ekzamenoj fariĝas celo. Sed tiuj ekzamenoj estas organizitaj de la Franca Esperanto-Instituto por la francaj esperanto-parolantoj. Parto de la provtaskoj konsistas el tradukoj. Tiel la kursgvidanto estas kelkafoje ĝenata. Pro tio la konsilio insistis, ke la kursoj celas al akiro de la lingvoelementoj aŭ al plibonigo de la konoj kaj praktikado, ne al ekzamenprovoj, La kursoj mem estu gvidataj nur en esperanto.

LES EXAMENS DE L'INSTITUT FRANÇAIS D'ESPERANTO A GRESILLON

RESULTATS DE L'ETE 1977

Atesto pri lernado :

Adnet Raymonde, Blatier Robert, Cavelan Juliette, Cavelan Jean-Pierre, Chevet Yvonne, Doye Daniel, Durandeau Jean-Pierre, Feneyrol Monique, Feneyrol Olivier, Galmache Rita, Gaubert Louise, Grela Raoul, Grela Willy, Lemarchand Nicole, Mathé Pierre-Etienne, Mélotte Evelyne, Norga Charles, Raub Andrée, Salliot Germaine, Schoonbroodt Simone, Vano Ghislaine, Vilhelm Margaretha, Wallez Gilles.

Atesto pri praktika lernado :

Binche Marc, Blatier Robert, Bourrelly Mireille, Cavelan Jean-Pierre, Doye Daniel, Galmache Rita, Grela Marie, Mounier Clarisse, Norga Charles, Vilhelm Margaretha.

Atesto pri kapableco :

Ont réussi les épreuves orales : Bourdon Louis, Guidon Angèle, Thibé Jacques.

Cours Cseh :

Beets Léo, Blockmans Josée, Chevet Yvonne, Dairon Rémi, Dumas Annie, Dumas Olivier, Dumas Yves, Espérabé Pierre, Feneyrol Monique, Larose Colette, Pallier Bruno, Rayer Gaston, Reitsma Jan, Vilhelm Christian, Vilhelm François.

Internaciaj ekzamenoj de Grésillon :

Nivelo A : Akkermans Diane, Hagedoorn Wim, Hagedoorn Chris, de Schepper Monique, Van der Bos Marie-Lise.

Nivelo B : Hagerdoorn Jan.

NOS PEINES

Trois ans et demi après sa sœur Blanche, Jeanne Vazon est décédée le 28 octobre. L'une et l'autre étaient de grandes amies de la première heure de la Maison Culturelle. Leur générosité, leur amour de la justice les poussaient à défendre activement toutes les justes causes. Leurs amis, ils sont nombreux, ne les oublieront pas.

NOS JOIES

Muriel Benazet, fille de nos amis Claire et René Bénazet, de Perpignan, a épousé, en octobre, Urs Hauswirth. Tous nos vœux accompagnent les nouveaux époux.

LA REVUE

Nous essayons de rattraper notre retard dans la parution de « Kulturaj Kajeroj ». Nous allons faire notre possible pour ne pas nous laisser à nouveau déborder. Vous pouvez nous aider en envoyant très vite vos abonnements 1977 ou 1978. Merci.

ABONNEMENTS BIENFAITEURS (1977)

F. Maury (69)	30
F. Herbst (All. féd.)	30
K. Nissen (All. féd.)	30
M. Purschke (All. féd.)	30
M. Rinke (All. féd.)	30
J. Weiddacher (All. féd.)	30
H. Wielgus (All. féd.)	50
J. Boulogne (36)	35
L. Lentaigne (34)	30
P. Piosson (37)	30
E. Richard (44)	30
Ferv. Grupo Kassel (All. féd.)	30
B. Babin (56)	30
J. Rousseau (75)	30
S. Bavay-Gilliard (69)	30
Total :	**475**

ABONNEMENTS BIENFAITEURS (1978)

A. Serre (66)	100
G. Wallez (93)	30
A.-M. Bentz (31)	30
J. Bernard (59)	30
G. et M.-B. Goudin (91)	100
G. Drezet (25)	30
J. Amouroux (66)	50
J. Thiébaud (70)	30
H. Genuit (10)	30
J. Tuffier (92)	30
G. Lhéritier (92)	30
A. Capus (34)	30
R. Sarrut (48)	30
M. Granier (38)	30
G. Dieusaert (92)	30
Total :	**610**

Conseil d'administration du 23 Octobre 1977

Sont excusés : MM. Bodereau, Chevalier, Guillaume, Guillot, Le Magadure, Philippeau.

La séance est ouverte à 9 h. 40, sous la présidence de M. Babin.

Le bilan financier provisoire au 15 octobre laisse apparaître des disponibilités pour un montant de 105.377 F., ce qui, compte tenu des factures et des charges qui restent à payer, permet d'envisager environ 50.000 F. d'investissements en 1978. On note dans les recettes une augmentation des séjours qui correspond à l'augmentation des tarifs. La fréquentation du château a été cette année identique à celle de l'année précédente, mais les stages ont été mieux équilibrés. Côté dépenses, on note une diminution du chapitre alimentation et une augmentation des dépenses de librairie dues à la réédition de « Por la praktikantoj ». Les investissements ont été de 65.000 F.

Le problème de l'organisation des examens a été soulevé. Le but de Grésillon est de faire pratiquer l'esperanto par tous, ce qui, à certaines périodes, peut amener l'organisation de cours uniquement en esperanto qui ne peuvent prétendre préparer à un examen en deux ou trois semaines. Il est néanmoins nécessaire de laisser aux participants la possibilité de passer les examens à Grésillon.

Le calendrier des stages pour 1978 a été fixé comme suit :

Pâques. — Du 9 au 15 avril : stage de jeunes.

Eté. — Du lundi 3 juillet au dimanche 23 juillet : conférences (administration, M. et Mme Babin) ; du lundi 24 juillet au dimanche 13 août : cours (administration, M. et Mme Dairon) ; du lundi 14 août au dimanche 3 septembre : cours (administration, M. et Mme Guillot).

Certains passages ont déjà été annoncés pour le quartième trimestre 1977 et le deuxième trimestre 1978.

Il a été décidé de faire exécuter une certain nombre de travaux : deux salles de cours seront aménagées dans les communs ; dans ces salles, le portail sera remplacé par une porte vitrée et l'installation électrique sera revue ; la chambre située dans les communs, à côté de la salle de reliure, sera refaite. Le maçon sera contacté pour aménager une remise à poubelles et cimenter le sol de la salle de ping-pong.

A l'intérieur du château, plusieurs aménagements sont prévus. L'escalier menant au deuxième étage sera terminé, et l'installation d'une friteuse est prévue dans la cuisine. De même, l'équipement du labo-photo sera complété. Enfin, est évoquée la nécessité d'avoir à Grésillon une machine à écrire en état, ainsi que du matériel de reproduction.

Lors de l'assemblée générale du printemps, six sièges du conseil d'administration seront à pourvoir. Les candidatures devront être déposées avant le 31 décembre, afin de permettre l'organisation du vote par correspondance. Le Conseil d'administration souhaite que des jeunes posent leur candidature.

A la suite du désir exprimé par de nombreux étrangers de subir à Grésillon un examen, une telle épreuve pourra être organisée. Un diplôme correspondant sera édité.

Le stock des « Normandaj Rakontoj » est maintenant déposé à Grésillon. Toutes les demandes de librairies devront désormais y être adressées.

La séance est levée à 16 h. 30.

Le secrétaire de séance :
R. JELENC.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :	
noir :	0,60 F.
couleur :	0,80 F.
Cuillères de collection :	13,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin

Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

Quelques livres d'Edmond Privat

Vivo de Zamenhof (14 frs)
Aventuroj de pioniro (14 frs)
Junaĝa verkaro (14 frs)
Karlo (5 frs)
Vivo de Gandhi (20 frs)